
# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo novembro 2020**

## RETAJ KUNVENOJ

Kiel ni anoncis en pasinta Nia Voĉo, la 3an de oktobro, la unuan sabaton de la monato, madridanoj renkontiĝis, sed ĉijoje rete pro la sanitaraj cirkonstancoj. Ni uzis la retejon Jitsi, pere de la adreso https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto. Sekve al nia anonco en la retejo EventaServo, kaj danke al la teknologioj, ni havis kompanion: du brazilaj amikoj aliĝis al nia konversado.




En novembro ni ripetos la sperton, en la sama loko kaj utiligante la saman adreson. Do, ni invitas ĉiujn madridajn esperantistojn, kaj ankaŭ niajn ekstermadridajn amikojn, konektiĝi al tiu adreso, la 7an de novembro, denove je la 6a horo. La proceduro estas ja tre facila, kaj ni kuraĝigas vin ĝin provi: utiligu la programon Jitsi en via komputil- aŭ telefon-sistemo kaj aliru "MadridaSabataRenkonto" aŭ eniru per via navigilo en la supre menciitan adreson.

Informo kaj ligilo aperas ankaŭ en: https://eventaservo.org/e/NovembroEnMadrido, pri kiu vi povas atentigi viajn ekstermadridajn amikojn.

## NOKTO DE LA LIBROJ

Alia reta renkonto okazos kelkajn tagojn pli poste, ene de pli ampleksa iniciato. Jam en aprilo la registaro de la madrida regiono planis okazigi aron de eventoj sub la nomo "Nokto de la Libroj", kun planoj pri partopreno de Madrida Esperanto-Liceo, sed devis ĝin nuligi pro la tiam furiozanta pandemio. Oni nun renovigis la klopodon, kaj oni anoncis ĝin por la venonta 13a de novembro. Ankaŭ MEL planas ĝin partopreni, sed virtuale.

Mankas ankoraŭ konfirmo ke la evento povos okazi kie antaŭplanite, pro la nunaj cirkonstancoj, kaj do ni ne povas nun konfirmi la detalojn, sed, se ĝi konfirmiĝas, ni atendas vin por komuna festado de la libroj en Esperanto, tiun tagon je la 18,30, ĉe la adreso https://meet.jit.si/noktodelibroj. Rezervu la daton!

madrida esperanto-liceo
Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid
http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es
Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

## TAGO DE LA VERKISTINOJ




Kiel ni anoncis en la pasinta bulteno, la 19an de oktobro la Nacia Biblioteko de Hispanio (BNE) organizis la kvinan eldonon de la Tago de la Verkistinoj, kun la partopreno de la Biblioteko Juan Régulo Pérez de HEF. Nia kontribuo konsistis en la prezentado per video de diversaj tekstoj de hispanaj aŭtorinoj tradukitaj al la internacia lingvo.

Vi povas nun spekti la videojn en la jutuba kanalo de HEF https://www.youtube.com/esesperanto, kaj konkrete ĉe la ludlisto kun la adreso: https://www.youtube.com/playlist?list=PLX5Zs1YSAzT5LEemxj5SFJI8ow4ZJzasX.

## AMPLEKSIGITA LA PERIODO POR ALIĜI AL LA KURSOJ EN UNED

Se vi planis aliĝi al la kurso de Esperanto (aŭ de aliaj lingvoj) en la Centro pri Lingvoinstruado CUID de la Universitato UNED, ne zorgu: oni anoncis la plilongigon de la periodo por enskribiĝo. Ĝi daŭros ĝis la 10a de novembro. Memoru ke ĉijare eblos aliĝi al du niveloj: la A2 (baza, se oni nenion scias pri Esperanto) kaj B1 por progresantoj. Ni povas konfirmi ke jam aliĝis sufiĉe da homoj por ke ambaŭ kursoj disvolviĝos en la jaro 2020-21.

Jen la adreso por enskribiĝo: https://app.uned.es/portal/admision-matricula-por-internet. Pliaj detalojn eblas legi ĉe: http://cuid.uned.es/.

## NOVA ESTRARO DE HEF

La 18an de oktobro okazis Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, en kiu estis elektita nova estraro de la asocio. La nova prezidanto estas la konata aktivulo Ángel Arquillos, malagano kiu antaŭ pluraj jaroj loĝis en Madrido kaj estis membro de nia grupo. Kvar loĝantoj en la madrida regiono membros en la nova estraro: Manolo Parra kiel nova sekretario, Isidoro Ortega kiel vicsekretario, Ana Manero kiel voĉdonanto kaj William Guerrero kiel voĉdonanto kaj prezidanto de la junulara sekcio, HEJS.

Bonŝancon kaj bonan laboron al la nova estraro!

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo provizore plu malfermiĝas dum la lundaj vesperoj, kaze ke vi deziras fari iun ajn demarŝon aŭ rendevui kun la tie deĵorantaj respondeculoj, sed memoru ke kunvenoj estis nuligitaj kaj ni daŭre petas ke vi anoncu vin kaj vi prenu la normalajn antaŭzorgojn

Por informiĝi pri daŭraj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/. Por la reta renkonto en novembro, vidu: https://eventaservo.org/e/NovembroEnMadrido.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com